

La 12an de julio 2016

Kion oni faras por forĵeti la 4 reaktorojn en Fukuŝima

Hodiaŭ mi tradukos artikolojn aperintajn en la ĵurnaloj Asahi kaj Mainiĉi pri la laboro en la forĵetataj reaktoroj.

Kion oni faras por forĵeti la reaktorojn?

(el la artikolo de Mainiĉi la 7an de marto 2016)

Demandanto: Mi aŭdas, ke en Fukuŝima oni laboras por forĵeti nukleajn reaktorojn. Kio estas “forĵeti reaktorojn”?

Respondanto: Forĵeti reaktoron signifas malkonstrui konstruaĵojn de la nuklea centralo. En Fukuŝima oni nun preparas sin por elpreni fandiĝintajn nukleajn brulaĵojn el la reaktoroj.

Demandanto: Kiom progresis tiu forĵeta laboro?

Respondanto: Oni atingis nur la unuan etapon. La nuklea centralo de Fukuŝima akcidentis plej malbone en la historio. Oni devas paralele forĵeti la tri reaktorojn, en kiuj nukleaj brulaĵoj fandiĝis, do oni antaŭvidas, ke por tio oni bezonos 30~40 jarojn.

Demandanto: Kion oni faras en la centralo?

Respondanto: Tage ĉirkaŭ 7000 homoj eniras en la centralon kaj okupiĝas pri diversaj laboroj, ekzemple forĵetado de rompiĝintaj betonaĵoj, muntado de akvujoj por poluita akvo, kontrolado de tralikiĝo de poluita akvo el la akvujoj ktp.

Demandanto: Ĉu tiuj laboroj ne estas danĝeraj?

Respondanto: Laboristoj surportas plastran vestaĵon por eviti poluaĵojn kaj malgrandan aparaton por mezuri radioaktivecon. En la lokoj tre radioaktivaj ili kovras sian kapon kaj surportas maskon. Ili laboras, riskante sian vivon per elmetiĝo de radioaktiveco, sed ili diras: “Por solvi la problemojn, iuj devas labori, do mi laboras”. Ili surportas ŝirmveston, tial en somero ili riskas sian vivon ankaŭ pro varmoatako.

Demandanto: Mi deziras, ke ili laboru singarde.



Laboristoj atendas busojn en V-vilaĝo, kiu estis piedpilkejo antaŭ la akcidento, donacita al la gubernio Fukuŝima de TEPCO por subpremi malkontenton pro la nebonvenaj nukleaj centraloj.

Laboristoj tremas pro malvarmo.



Vidiĝas grandaj akvujoj, en kiuj oni konservas poluitan akvon po 1000 tunoj. En tri tagoj unu akvujo fariĝas plena, ĉar ĉiun tagon enfluas 400 tunoj da akvo sub la detruitajn reaktordomojn kaj malpuriĝas pro radioaktiveco. Tiuj

akvujoj ne estas bone faritaj, do foje okazas tralikiĝo de poluita akvo.



Grupestro kontrolas per dozmetro kvanton da radioaktiveco. Kiam estas tro radioaktive, li ordonas al la laboristoj forlason de la loko. Tamen okazas, ke li ordonas, ke ili plu laboru por finu la laboron, ne forlasante.



Slogano alvokas: “Ĉiuj reduktu po 0,01 milisiverton tage”. Ekster la centralo 5,52 mikrosivertoj tage estas la maksimuma kvanto da radioaktiveco, kiun ordinraj homoj povas

elmetiĝi. 5,52 mikrosivertoj estas 0,00552 milisiverto.

Ĉu sufiĉas laboristoj?

(el la ĵurnalo Mainiĉi, la 7an de marto 2016)

La ĵurnalo Mainiĉi enketis inter 246 kompanioj, kiuj sendas laboristojn al la centralo, kaj ricevis 42 respondojn.

Demando: Ĉu sufiĉas laboristoj?

20 kompanioj: sufiĉas aŭ relative sufiĉas.

21 kompanioj: ne sufiĉas, relative ne sufiĉas.

Demando: Kio estas kaŭzoj de manko de laboristoj? (Oni rajtas elekti plurajn kaŭzojn)

10: Maljunaj spertaj laboristoj forlasas pro aĝlimo, sed ne venas anstataŭaj junaj laboristoj.

7: Estas malfacile transdoni spertojn.

6: Estas forte radioaktive, tial novaj laboristoj ne kuraĝas veni.

Komentoj:

* En la konstruata industrio mem mankas laboristoj, do estas malfacile varbi laboristojn por la centralo.

* Oni nun varbas laboristojn kvante, sed ne kvalite. Mankas spertaj laboristoj.

*Pro la konstruado por la Olimpikoj en Tokio en 2020 mankas/os laboristojn por la centralo.

Demando: Ĉu vi antaŭvidas, ke la forĵetado finiĝos en 2051 laŭ la plano de la registaro?

20: Jes.

15: Ne.

Demando: Kial ne?

* Estas tre malfacile forĵeti radioaktivajn rubaĵojn kaj poluitan akvon.

* Troviĝas multe da teknike malfacilaj laboroj.

* Troviĝas multaj laboroj en forte radioaktivaj lokoj.

Demando: Kiam kaj kie okazos riskoj por laboristoj?

20: elprenado de fandiĝintaj nukleaj brulaĵoj

16: elprenado de uzitaj brulaĵoj

10: Malkonstruado de reaktordomoj

Kiamaniere laboristoj laboras en la centralo?

(el la ĵurnalo Asahi la 11an de marto 2016)

Je la 5a horo matene de J-vilaĝo (bazo por forĵetado de la nuklea centralo de Fukuŝima) sinsekve ekveturas

busoj al la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima situanta 20 kilometrojn for, portante laboristojn. S-ro A loĝanta en la najbara urbo Iŭaki estas inter ili. Li laboras por malgranda kompanio en la kvaratavolo sub TEPCO. Li ellitiĝas je la 3a kaj duono, kaj je la 4a li veturas al J-Vilaĝo per aŭtomobilo sendita de la kompanio. Li



Li surportas kvin subvestojn, du ŝtrumpetojn kaj du gantojn krom poŝvarmigilojn (foto) inter la vestoj, sed li ankoraŭ sentas malvarmon.

Lia laboro estas instalado de tuboj por poluita akvo. La tereno kovrita per feraj plankoj ŝajne estas pli pura ol post la akcidento, sed la reaktordomoj estas mizeraj kun detruitaj betonaj muroj kaj nudaj ĉifitaj feraĵoj. “Ju pli

proksime al la reaktordomo, des pli radioaktive”, li diras.



Li surportas dozmetron. Kiam la radioaktiveco superas 0,16 milisivertojn, ĝi alarmas lin per zumado. Se ĝi zumas trifoje, la laboro en tiu tago finiĝas.

Laboro en somero estas pli severa. Laboristoj kovras sin per masko kaj

Sekura ŝuo

ŝirmvestoj. Ili metas glacieron interne por eviti varmon, sed post 30 minutoj ĝi degelas. Iun tagon mezaĝa viro estis svene kuŝanta en la ripozejo. Oni portis lin per helikoptero al hospitalo, sed poste li mortis pro varmoatako.

5 jarojn antaŭe, en tiu tago, li estis laboranta en la reaktordomo n-ro 1. Lumo malaperis. Io haltis kun granda bruo. Li eksteren kuris kaj trovis, ke la betona pavimo fendigis kaj vitraĵoj disĵetiĝis. Li enkuris en la oficejan konstruaĵon.

Post okazis kontrolado de la stato de la laboristoj, kaj vespere li revenis hejmen. Li ne vidis la cunamon. Hejme, pro streĉo kaj febro li suferis pro urtikario. En la sekvanta tago la reaktordomo, kie li laboris, ekplodis pro vaporo.

Kelkajn tagojn poste li rifuĝis kun siaj familianoj ĉe unu el la parencoj en la urbo Nagoja. En majo la prezidanto de la kompanio telefonis lin, petante, ke li denove laboru en la nuklea centralo. Tiam lia filino estis unu-jara, kaj persvadinte sin, ke por vivtenado tio estu la sola rimedo, li revenis al Fukuŝima. Li ricevis 11000 enojn tage. (110 eŭrojn).

* Laŭ advokato Hirota Hideo, kiu helpas laboristojn pri salajlaj aferoj, diras: “TEPCO donas laboron al ĝuste suba kompanio, kaj tiu ne mem faras tiun laboron kaj transdonas ĝin al siaj subaj kompanioj... tiamaniere troviĝas kelkaj tavoloj de kompanioj kiel piramido, kaj en ĉiu tavolo tiuj kompanioj suĉas monon kiel makleraĵon. En iu kazo TEPCO pagis 43000 enojn (430 eŭrojn) tage por unu laboristo al la ĝuste suba kompanio, sed laboristo

en la tria-tavola kompanio ricevis nur 11500 enojn (115 eŭrojn). Se oni ne nuligus tiun sistemon, neniam malaperus tiu monsuĉsistemo.”

* S-ro Kacura Takeŝi, kiu helpas laboristojn en la nukleaj centraloj, diras: “Ankoraŭ troviĝas laboristoj, kiuj laboras sen papera kontrakto. Kompanioj, kiuj dungas laboristojn, devas havi respondecon pri iliaj salajlo, sekureco kaj asekuro”.